

PENSEO

N-ro 245

mar. / 2012

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994


Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 23-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinio)



degenero

ĉiuj imperiestroj vekigās el tomboj.
 studentinoj volas iĝi
 iliaj feniksoj aŭ paseroj.
 la karno pli valoras ol la cerbo.
 litoj el oro kaj pugnaroj
 estas palacoj kreantaj diojn.
 la sceptron pesilon klinitan
 anstataŭigas per kompasoj.
 en la direkto jam drinkinta
 savitoj akuzas savintojn
 pri akcidentoj kaj tertremoj.
 spektante homfaritajn katastrofojn,
 gebestoj rondan vojon prenas.
 infano estis renversita
 de aŭto kaj ankaŭ
 ties sekvanto fuĝis for - de sur ŝi.
 dekoj da rigardantoj aprezis la scenon,
 kun la manoj en la poŝoj de la pantalono.
 la radoj kun la sango burĝona
 flugis en la sinon de hudhao.
 laozoj kaj zhuangzi ridas sur lotuso blanka.
 lasu la nigron kovri la sunon!
 aviadilŝipoj estas lunoj kukaj.
 invitu en viajn hejmejojn murdintojn
 por ke tiuj ĉi instruoj vin buĉadi viajn filojn
 ĉar ili donacis morton al viaj gepatroj
 piaj



Cindy Mckee (Usono)



Fuŝestaĵo

Kara fuŝestaĵo,
 Viktimo de emocioj,
 viaj vundoj sangas en diverskoloroj,
 en rojoj al via grundo.
 Kie sango nutras florojn.

Viktimo de la kapo,
 sendu bondezirojn al la mondo,
 ĉar vi ne vere ĉeestas.
 Vi nur enestas,
 skribante ke vi estas.

Revenu al via grundo.
 Floroj estas.



Biografio de mensoyo

Dornoj edukis min
 dum petaloj forfalis.
 "Atendu la sunon."
 Flustris nekonato.
 La leviĝanta suno anoncis subiron.
 Nane mi protestis: Ne normalas, tio!
 Radioj respondis: Vi ne konas normalecon.
 Normala vi neniam estos.
 Kaj la suno, gaja kaj bunta, ripetis kion mi
 protestis.
 Hieraŭ, hodiaŭ kaj --

Morgaŭos mistifika tago, do.
Do ek al Oklahomo.
Kie mi bruligas radiojn de morgaŭo.

Sen posedaĵoj miaj, sufiĉas ke mi ne posedas
vian biografion.



Polvo en danco

Estas tro en ĉiu momento.
Mi neniam tuŝos sufiĉe, rigardos, aŭdos aŭ
gustumos sufiĉe.
Kaj dronante en momento, momento leviĝas.
La muro teksturas kiel veluro dum vi parolas,
ĉu vi scias?
Suno dancigas polvon kaj ie muziko.
Momento leviĝas.
Kaj momento leviĝas.



Lenke (Rumanujo)



Atendu nur...

Ne strebu ĝin meriti,
ne provu ĝin akiri -
La amo
estas donaco
kaj dia graco.

Nur atendu,
ke ĝi alvenu -
La koron vi malfermu

kaj atendu,
nur atendu...

Ne volu ĝin akiri,
ne strebu ĝin meriti,
ĉar estas dia graco,
se trovas vin - la Amo.

Ruĝaj beroj

Neĝkampo blankas, vintra vento muĝas,
Sed beroj de sovaĝa rozo ruĝas.
Eĉ se la vivo ŝajnas nun dezerto,
Atendas nin foj-foje bela sperto.



Guozhu (Ĉinujo)



Wang Luobin

Wang Luobin en la okcidento
Majstre kantas pri la knabino
malproksima kun rev' sen fino,
dum lante leviĝas krescento.

Verŝiĝas la luna arĝento
al tendo kun sorĉa fascino.
Wang Luobin en la okcidento
Majstre kantas pri la knabino
Klasike kantikas amsento
pri levo de ruĝa muslino.
Nomas lin reĝo laŭ destino
ĉiuj en komuna konsento.

Wang Luobin en la okcidento.

2012-02-02

<K, la arto de amo>

El plumo de Hong Ying aperis
roman' pri la Angla Amato.

Tajdojn da ŝato kaj malŝato
famon kaj fifamon konkeris.

Julian jun-vivon oferis,
kaj Lin ankaŭ mortis pro fato.
El plumo de Hong Ying aperis
roman' pri la Angla Amato.

La paro intime amkveris
en Wuhan-Universitato.
Nun dudek kvin-lingva sonato,
pri kiu ni inde fieras,

pro verko de Hong Ying aperis...

2012-02-14

Trioletto

Mi sendas en Tag' Valentena
al vi gratulan bondeziron.
Poemon kun saluto bona
mi sendas en Tag' Valentena.
Etoso romantiko plena
reprezentas mian sopiron.
Mi sendas en Tag' Valentena
al vi gratulan bondeziron.

2012-02-14

Li Yuping (Ĉinujo)



Trioletto

Pro karto en Tag' Valentena
koran dankon al vi mi diras.
Bedaŭre sen poemo bona
vin danki en Tag' Valentena.
Ĉie fonas bril' aromplena,
pri kara amiko sopiras.
Pro karto en Tag' Valentena
koran dankon al vi mi diras.

Cindy Mckee (Usono)

Trioletto

Dum la tago de la koroj
ni estas malkaŝitaj
brulaj adoroj kaj amoroj.
Dum la tago de la koroj
en flam- kaj kor-ruĝaj koloroj
amparolas ni elpaŝitaj.
Dum la tago de la koroj
ni estas malkaŝitaj.

Mori (Usono)



LUPO kaj HOMO

1.

Lupo
disŝiras ŝafon
laŭ
NATURO
*
Homo
murdas hom-fraton
laŭ
KULTURO.

2.

Lupo
la plej sovaĝa
estas
homo-vizaĝa.

3.

Homo
pli kruelas ol
lupo
kaj pli ruzas ol
vulpo.

4.

Homo
estas pacama
laŭ
NATURO,
fariĝas batalema
laŭ
KULTURO.



Leieladonna (Meksikio)



Alla Kara Patrino de Antonio...

Ĵaŭde, nokte... dum vi dormis...
 vojaĝis serĉante stelon...
 nun vi prenos iun el ili...
 la plej bela por vi..
 kaj ankoraŭ vi elektas...
 libere...feliĉe...
 kie iri...
 Vi trovos amon; Vian edzon...
 kiu jarojn antaŭe forlasis vin...
 same... kiel vi nun...
 forlasas viajn amojn
 tiuj...viaj filoj...
 kiuj nun ploras kaj plendas pri vi
 amataj de vi, kaj vi amata de ili.
 Nun ili lernas amadon al Dio...
 ĉar la plej bela donaco de la ĉielo...
 Estas dormi kaj tiele sensufere...
 preni tiun stelon, neatingeblan por vi...
 ĝis nun...

**Kara Antonio: Tiele mi montras al vi amon kaj amikecon. Dio benu vin ĉiujn.*

Roland Platteau (Francujo)



Post unu monato

Kaj mal-
 supren tiu hontindaĵo venas.
 Kaj mal-
 supren tiun hontindaĵon flegas
 mi.
 Kaj mal-
 supren ankaŭ velkas
 mi.
 Kaj mal-
 supren via korpo iris
 al tiu cinika marmor'.
 Kaj mal-
 supren oni ĝin movis ;

okuloj turnis sin for.

Kaj nur honto
 restas, kiam larmo
 sekas.
 Kaj nepre tempo
 pliiĝos ĝis jaro.
 Vanas.

4/3/2002

Paŭlo Silas (Brazilo)



VIVAĴOJ KAJ LA MORTO

Flugilbatadoj similonaj al frotado
 De socimomentoj.
 Konsentoĉenoj senpersonaj sur la strato
 De homar-pretendoj.
 Sen limigo flugas ili en la vaston,
 Senmezure enkatenas ili l' arton.

Aersopiroj penspovantaj pri morgaŭo,
 Pri detru-ebleco.
 Maŝinkomprenoj antaŭvidas korpamason:
 Supermensa streĉo.
 Frukapabloj povas pensi pri frakaso,
 Plejmoderne sin detruas homa raso.

Tombejmemor' suprenĵetita vivoflanken,
 Alimondaj fajfoj.
 Junplena stat' antaŭenmarŝas vivomanken,
 Tragediaj trajtoj.
 Se, post elvelko korpa, restas la ideo;
 Ĝi batalados por postvivi la pereon.

Stanislaw Rynduch (Germanujo)



FEBRUARAJ KONSILOJ

Varmajn botojn en februaro,
 de vestaĵo la anaro,
 vestu ankaŭ ŝalon, ĉapon
 por ne perdi tutan kapon.

Tre malvarme, tre malvarme
en naturo tamen ĉarme.
Varmajn pensojn al vi faru,
varman vinon kulinaru.

Estas alia propono,
kiel varmi sin sen mono;
aman ludu la hormonon,
amu kune sen ŝablono.

Lasu sangon iom boli
kun amata am'frivoli.
Tuj malvarmon vi forgesos,
ESTIS BONE VI KONFESOS!

Nun radias hejme varmo,
kvazaŭ senĉese en darmo,
tiel kontente vivantaj,
la printempon atendantaj.

Februare, 2012

Cecilia Meireles (1901-1964)



Virino antaŭ spegulo

Hodiaŭ, ĉu tiel, iu alia,
mi estu, nu tio estas sen grav'.
Nur bela mi aspektu, kaj ne plia,
ĉar je mort' al neniu estas sav'.

Mi jam iĝis blonda, jam estis bruna,
estis Margerita, kaj Beatric'.
Al Maria kaj Magdalena una
iĝis. Nur mem esti estis ne lic'.

Kia noc' estas ŝanĝ' de harkoloro,
kaj alieciĝ' de mia vizaĝ'
se de la mondo la tuta doloro
vundas sen eĉ etŝajno de damaĝ'?

Ekstere nu mi iru laŭ la volo

de la modo, kiu mortigas min.
Ĉi ulo jam sen haŭto, sen parolo
je dispono de ia ajn destin'.

Oj, tiu kun sekiĝintaj okuloj,
brakoj, kaj sen plu vivoalibi',
estas mortonto plene sen makuloj,
kiu nepre ja parolos kun Di'.

Parolos, kaj sub kia lumoŝpruco,
de l' hararanĝo al pied-artik'.
Ĉar iuj velkiĝas sur sia kruco,
aliaj antaŭ spegul-artifik'.

* *Cecília Benevides de Carvalho Meireles*
(Rio-de-Janeiro RJ: nov 7-an 1901 - nov 9-an 1964)
estis poeto, instruisto, ĵurnalisto kaj pentristo. Oni
konsideras ŝin unu el la plej gravaj lirikaj voĉoj kadre
de portugallingvaj literaturoj.

Tradukis



Ŭel (Brazilo)



Luis Gómez Escolar

Ea

Pasos for la horoj,
la tagoj svenos,
kaj sopiros mia kor'
al la tempo apud vi.

Helpe de memoroj
mi vin retenos.
Mialange sen pudor'
vian guston revos mi

Ha, kaj ĝis vi revenos
 ha, garde mi plu tenos
 ha, mian vivon nur por vi.

ea, ea, eeeeea, aj aj
 aj aj aj ea
 ea, ea, eeeeea, aj aj
 aj aj aj ea

Kantu al mi ajnon
 laŭ via sento,
 kaj mi plu atendos vin,
 ĝis la fino de la tempo.

Vin mi sonĝos febre
 ĉe l' frumateno,
 kaj parolos mi pri vi,
 kara, ĉiam nur pri vi.

Ha, kaj ĝis vi revenos
 ha, garde mi plu tenos
 ha, mian vivon nur por vi.

ea, ea, eeeeea, aj aj
 aj aj aj ea
 ea, ea, eeeeea, aj aj
 aj aj aj ea

Mi estas mar',
 vi onda movo,
 kiun tajde pelas via koro.

Originala titolo: Ea

Muziko: Diana Navarro, Chico Valdivia, Manuel Illán

Teksto: Luis Gómez Escolar

Tradukis



Svena Dun
(Hispanujo)

Julius Balbin

NIA SOLA POSEDAĴO

En la getto
 kie ankoraŭ
 estis eble
 amori
 mi renkontis ŝin.
 Ni ambaŭ havis dek ses jarojn
 kaj hontis
 pri niaj nudaj korpoj.
 Tenante nin per la manoj
 ni timeme ĉirkaŭbrakis.

En la koncentrejo
 ni estis apartigitaj
 per la pikdratoj
 sed nia ardo
 ignoris barierojn.

La serĉlumoj
 de la gardoturoj
 spionis la mallumon
 kiam mi rampis
 al la virinaj barakoj
 sub la dratoj
 kaj tordiĝis
 inter vivo kaj morto

Mi atingis la pordon
 malfermis ĝin
 kaj ŝtele englitis
 ĝis kie la flustro de mia amata
 gvidis min al la plej supra priĉo
 kie ŝi atendis nuda.

La koŝmaron de la realo
 englutis
 la abismo
 de nia ĉirkaŭbrako
 kaj ni soris
 al la alto
 de ĉio homa
 penetrante unu la alian.

La virinoj ĉirkaŭ ni
 dormis suspirante aŭ ronkante

dum ni estis transe de ĉio

bridante niajn pasiojn
 aŭ silentigante niajn ĝemojn.
 Ni koitis
 en la febro kian niaj korpoj
 neniam konis.
 Ni posedis nenion
 krom unu la alian.
 Dividante tiujn momentojn
 ni moviĝis kun la ritmo
 de la luno kaj la steloj
 kiuj brilis super ni
 eterne.

esperantigis



Jozefo E. Nagy
(Rumanujo)

Wisława Szymborska (1923-2012)



Mikrokosmo

Kiam oni komencis uzi mikroskopon
 ekblovis teruro kaj ĝis nun ĝi blovas.
 La vivo ĝis tiam sufiĉe frenezis
 en siaj formoj kaj dimensioj.
 Ĝi ja kreadis minusklajn estaĵojn,
 iajn muŝetojn, vermetojn,
 sed almenaŭ nud-okule
 ilin eblis vidi.

Kaj subite, sub vitreto
 tut-diversaj, tut-troige
 signifaj,
 ke eĉ la spacon de ili okupitan
 nur pro kompatado eblas nomi – loko.

La vitret' eĉ ilin ne kunpremas,
 sub ĝi ili multobliĝas senobstakle
 tut-pelmele kaj hazarde.
 Diri, ke ili multas – ne multe dirite.

Ju pli forta mikroskopo,
 des pli fervora, pli ekzakta multipliko.

Ili eĉ ne havas dignan intestaron,
 ne scias pri sekso, infanaĝ', maljuneco.
 Eble eĉ ne scias pri propra ekzisto
 Ili tamen decidas pri nia viv' kaj nia mort'

Kelkiuj rigidiĝas en momenta senmovo,
 kvankam ne konatas ilia momento.
 Se ili tiel etas,
 verŝajne eĉ daŭro
 estas por ili laŭmezure eta.

Alblovita pulver' ja por ili aerolito
 el profunda kosmo
 kaj fingrospuro – vasta labirinto,
 kie ili povas kuniĝi
 por siaj silentaj paradoj
 siaj blindaj iliadoj kaj panikadoj.

Jam de longe mi volis pri ili skribi,
 sed malfacilas la temo,
 daŭre prokrastigata
 kaj certe digna pli bonan poeton,
 pli ol mi pri la mondo mirantan
 Sed urĝas la tempo. Mi skribas.

Esperantigis el pola



Helena Tyłipska
(Italujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Amatino en la koro

okaze de Valentena Tago 2012

—laŭ ĉineska skemo Shengshengman*
 en mia kor'

vi amatin'
 min amas kun fervor'
 sincere dum jaroj
 sed sen amor'
 sen intimaj tuŝoj
 ni kveras
 en ĉiu hor'
 vi ĉarma
 kreitaĵ'
 jen de Dia favor'

kun ardanta ador'
 mi flegas
 vin nure en memor'
 vin sekrete
 kaŝas, mia trezor'
 ja en mian sinon
 eterne
 vi freŝa flor'
 tenu vin
 plezura en bonhumor'

Lily (Ĉinujo)

Flava rozo


—laŭ ĉineska skemo Shengshengman*

kun morna kor'
 flavan rozon
 je Valentena hor'
 mi al vi prezentas
 en trista plor'
 vian foriron mi
 ne volas
 sed per ignor'
 okula
 vi celas
 al alia sinjor'

jen en flava rozflor'
 vizie
 nia dolĉa amor'
 voluptema
 mia mania bor'

vivece aperas
 bedaŭre
 nun kun rankor'
 adiaŭ
 mi diru al vi en for'

*Shengshengman (lanta sontreniĝo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x = senrima)



Niuniu (Ĉinujo)

Neĝo en nordo

—lai ĉineska skemo Pusaman*

neĝo sana kaj pura
 en nordlando natura
 kuŝas kviete
 blanke kokete

kun fajna mildo
 de kreta bildo
 kun voĉa softo
 de paŝa ofto

*Pusaman (budhista dancisto): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

Densa nebulo en Pekino

—laŭ ĉineska skemo Tasuoxing*

Ĉe mateno
 jam nebulo
 densa en disflos-rulo
 ŝlosas la urbon blanke.
 Ĉio en bruma lulo.

Aŭtoj iras
kun skrupulo.
Pro maltrankvila brulo
pasantoj palpas blinde
en l' izola insulo.

**Tasuoxing (paŝo sur herbo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 44,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa,a,xa (x=senrima)*



Maupassant (1850-1893)



UNU NORMANDO

al Paul Alexis [Paŭlo Aleksi]

Ni ĵus eliris el Rueno, kaj ni grandtrote veturis sur la vojo de Jumièges [Ĵumiej']. La malpeza veturilo rapidis tra la herbejoj; poste la ĉevalo ekpaŝadis por supreniri la deklivon de Canteleu [Kaŭtělë].

Tio estas unu el la plej grandiozaj horizontoj, kiuj estas en la mondo. Malantaŭ ni Rueno, la urbo al la preĝejoj, al la gotikaj sonorilturoj, prilaboritaj kiel eburaj bagatelaĵoj; aliflanke Saint-Sever [Sankta-Sëver], la antaŭurbo al la manufakturoj, kiu starigas siajn mil fumantajn kamentubojn al la granda ĉielo fronte al la mil malprofanaj sonorilturetoj de la malnova urbo.

Tie ĉi la spajro de la katedralo, la plej alta pinto de la homaj monumentoj, kaj tie for, la "Fajropumpilo" de la "Foudre" [Fulmo]*, ĝia konkuranto preskaŭ tiel supermezura, kaj kiu superas je unu metro la plej gigantan

piramidon de Egiptio.

Antaŭ ni Sejno disvolviĝis, ondomova, semita de insuloj, dekstre bordita de blankaj klifoj, kiujn kronis arbaro, maldekstre vastegaj herbejoj, kiujn limigas alia arbaro, tie for, tute tie for.

De loko al loko, grandaj ŝipoj staris ĉe la ankro laŭlonge de la bordoj de la larĝa rivero. Tri grandegaj vaporboatoj unuvicite foriris al Havro, kaj ĉeno da ŝipoj, formita de unu trimastulo, du goletoj kaj unu brigo almonte iris al Rueno, trenata per malgranda trenŝipo, kiu vomis nubon de nigra fumo.

Mia akompananto, naskinĝinta en la lando, ne eĉ rigardis tiun mirigan pejzaĝon; sed li senĉese ridetis; li ŝajnis ridi en si mem. Subite, li eksplodis: "Ha! vi tuj vidis gajigan aĵon, la kapelon al la ulĉjo Mateo. Tio estas frandaĵo, mia bonulo."

Mi rigardis al li per mirigita okulo. Li reparolis:

– Mi tuj flarigos al vi Normandan aromon, kiu restos en via nazo. La ulĉjo Mateo estas la plej bela Normando de la provinco, kaj lia kapelo unu el la mondaj mirindaĵoj, nek pli nek malpli; sed unue mi tuj donos al vi kelkajn klarigovortojn.

La ulĉjo Mateo, kiun oni ankaŭ nomas la ulĉjon "La Drinkado", estas eks-ĉefserĝento, kiu revenis en sian naskan landon. Li admirinde kunigas samproporcie, por fari perfektan tutaĵon, la petolecon de la malnova soldato al la ruza maliceto de la Normando. Reveninte al la lando, li fariĝis, dank'al oblaĵ protektoj kaj neverŝajnaj lertaĵoj, gardisto de mirakla kapelo, kapelo protektata de la Sankta Virgulino, kaj ĉefe vizitata de la gravedaj fraŭlinoj. Li baptis ĝian mirindan statuon: "Nia Damo de la Dika-Ventro", kaj li traktas ĝin kun ia spitema familiareco, kiu tute ne malebligas la respekton. Li mem verkis, kaj presigis, specialan preĝon por sia BONA VIRGULINO. Tiu preĝo estas ĉefverko de nevola ironio, de normanda spriteco, en kiu la

mokado miksiĝas al la timo de la SANKTAĴO, al la superstiĉa timo de la sekreta influo de io. Li ne tre kredas al sia patronino, tamen li iom kredas al ŝi, pro singardo, kaj li domaĝas ŝin, por la bono de sia afero.

Jen la komenciĝo de tiu mirinda preĝo: "Nia bona sinjorino la Virgulino Maria, natura patronino de la fraŭlinaj patrinoj en tiu lando, kaj tra la tuta tero, protektu vian servistinon, kiu malĉastis dum momento de forgeso."

Tiu favorpeta preĝo finiĝas tiamaniere: "Ĉefe ne forgesu min apud via sankta Edzo, kaj propetu Dion la Patro, por ke li donacu al mi bonan edzon, similan al la via."

Tiu preĝo, malpermesata de la klerikaro de la regiono, estas kaŝe vendata de li, kaj estas rigardata, kiel bonfara por tiuj, kiuj recitas ĝin kun pia afekteco.

Sume, li parolas pri la bona Virgulino, kiel faris lia mastro, la ĉambristo de timegita princo, konfidenculo de ĉiuj malgrandaj intimaj sekretoj. Li scias pri ŝi amason da amuzaj rakontoj, kiujn li mallauĉte diras, inter amikoj, post drinkadinte.

Sed vi ja vidis mem.

Ĉar la enspezoj provizataj de la Patronino ŝajnis al li nesufiĉaj, li aneksis al la Virgulino etan komercon de Sanktuloj. Ĉiujn li havas aŭ preskaŭ ĉiujn. Sed ĉar en la kapelo la loko mankis, li staplis ilin en la ŝtipejo, de kie li eliras ilin tuj kiam fidelulo demandas ilin. Li mem ĉirkaŭĉizis tiujn statuetojn el ligno, neverŝajne komikajn, kaj farbis ĉiujn per verda plenkoloro, iun jaron, kiam oni kalkoŝmiris lian domon. Vi scias, ke la Sanktuloj kuracas la malsanojn, sed ĉiu posedas sian specialaĵon; kaj necesas, nek interkonfuziĝi, nek erari. Ili ĵaluzas unu kontraŭ la alia, kiel aktoraĉuloj.

Por ne erari, la maljunaj virinoj konsultas Mateon:

– Por la oreldoloroj, kiu sanktulo estas la plej bona?

– Sed estas sankta Ozimo, kiu estas bona;

ankaŭ estas sankta Pamfilo, kiu ne estas malbona.

Tio ne estas la tuto.

Ĉar Mateo havas tempon pli ol necese, li drinkadas, sed li drinkas kiel artisto, kiel ulo konvinkita, tiel bone, ke li estas regule ebria ĉiuvespere. Li estas ebria, sed tion li scias; li tiel bone scias tion, ke ĉiutage li notas la ekzaktan gradon de sia ebrieco. Tio estas cetere lia ĉefa okupado; la kapelo estas nur la dua.

Kaj li inventis, – bone aŭskultu, kaj alkrampiĝu –, li inventis la ebriometron.

La ilo ne ekzistas, sed la observoj de Mateo estas tiel precizaj, kiel tiuj de matematikisto. Vi aŭdas lin senĉese diri: "De post lundo, mi preterpasis kvardek kvin."

Aŭ: "Mi estis inter kvindek du kaj kvindek ok."

Aŭ ankoraŭ: "Mi ja englutis inter sesdek ses kaj sepdek."

Aŭ iafoje: "Ega fripono, mi ja kredis min ĉirkaŭ en la kvindeko, kiam mi ekkonsciis, ke mi estis ĉirkaŭ sepdek kvin!"

Neniam li eraras.

Li asertas, ke neniam li atingis la metron, sed ĉar ankaŭ li konfesas, ke liaj observoj ĉesas esti precizaj, kiam li preterpasis naŭdek, ni ne povas plene fidi nin al lia aserto.

Kiam Mateo konfesas esti preterpasinta naŭdek, estu trankvila, li estas fiere brave ebriega.

Sub tiuj cirkonstancoj, lia edzino, Melia, iu alia mirindaĵo, freneze ekkoleras. Ŝi, starigita sur sia pordo, atendas lin, kaj kiam li eniras, ŝi hurlas: "Jen vi, aĉulo, porkulo, speco de drinkulego!"

Tiam Mateo, kiu ne ridas plu, fiere ekstaras fronte al ŝi, kaj per severa tono deklaras: "Silentu, Melia, ne estas la momento por babili. Atendu morgaŭ."

Se ŝi daŭrigas kolere kriadi, li alpaŝas, kaj kun tremanta voĉo li diras: "Ne plu bleku, mi estas ĉirkaŭ naŭdek, mi ne plu mezuras; mi tuj

frapos, estu singardema!"

Tiam, Melia retretas.

La postan tagon, se ŝi volas rediskuti pri la afero, mokante ŝin li respondas: "Ek! Nu! Sufiĉas, tio estas finita. Tiel longe, kiam mi ne atingus la metron, ne gravas. Sed se mi preterpasos la metron, mi permesos al vi, ke vi draŝu min, pri tio mi ĵuras!"

Ni ĵus atingis la supron de la suprenirejo. La vojo enprofundiĝis en la admirindan arbaron de Roumare [Rumar'].

La aŭtuno, la mirinda aŭtuno, miksis siajn oran kaj purpuran kolorojn al la lastaj verdaĵoj restantaj vivaj, kvazaŭ gutoj de fandita suno fluus de la ĉielo en la densecon de la arbaretoj. Ni trapasis Duclair [Dükler]; poste, anstataŭ daŭrigi al Jumièges, mia amiko turniris maldekstre, kaj uzante transversan vojon, enprofundiĝis en la arbetan densejon.

Kaj baldaŭ, ĉe la kulmino de granda suprenirejo, denove ni malkovris la grandiozan valon de Sejno, kaj la malrektan riveron, kiu kuŝiĝis al niaj piedoj.

Dekstre, tute malgranda konstruaĵo, kovrita per ardezoj, kaj superelstarita per sonorilturo, alta kvazaŭ ombrelo, apogis sin kontraŭ beleta domo, kun verdaj persienoj, tute vestita per Ioniceroj kaj rozarbetoj.

Forta voĉo kriis: "Jen amikoj!" Kaj Mateo aperis sur la sojlo. Li estis sesdekjaraĝa viro, maldika, kun kaprobarbo, kaj longaj blankaj lipharoj.

Mia akompananto etendis la manon por manpremo, prezentis min, kaj Mateo enirigis nin en freŝan kuirejon, kiu ankaŭ servis al li kiel salono. Li diris:

– Vidu, Sinjoro, mi ne havas eminentan loĝejon. Mi ja ŝatas, kiam mi ne tro malproksimas de la stufaĵo. La kaseroloj, vidas vi, neniam ili diskrete malkuniĝas.

Poste, sin turnante al mia amiko:

– Kial vi venis ĵaŭdon? Vi ja scias, ke estas la tago, kiam oni konsultas mian Patroninon. Ĉivespere, mi ne povas eliri.

Kaj, kurante al la pordo, li eligis teruran muĝadon: "Meli-a-a!", kiu devis levigi la kapon al la matrosoj de la ŝipoj, kiuj alvale aŭ almonte navigis sur la rivero, tie for, tute funde de la kava valo.

Melia tute ne respondis.

Tiam Mateo palpebrumis kun petoleco.

– Ŝi ne estas kontenta pri mi, vi vidas, ĉar hieraŭ mi troviĝis ĉirkaŭ naŭdek.

Mia najbaro ekridis:

– Ĉirkaŭ naŭdek, Mateo! Kiel vi faris tion?

Mateo respondis:

– Tion mi tuj diros al vi. La pasantan jaron, mi trovis nur dek hektolitrojn da abrikotopomoj, nun ne estas plu; sed por fari cidron, estas nur tio. Do per ili, mi faris cidran barelegon, kiun hieraŭ mi spilis. Por esti nektaro, tio estas nektaro, tion vi certe tuj aprecos. Polito ĉeestis; ni ektrinkis glason da cidro, kaj poste ankoraŭ alian glason, ne sensoifigante nin (ni trinkus tion ĝis morgaŭ), tiel, ke glason post glaso, mi sentis kiel freŝecon en mia stomako. Mi diris al Piloto: "Se ni tuj trinkos glaseton da supera pombrando, por ke ni revarmiĝu!" Li konsentis. Sed la pombrando, tio bruligas al vi la korpon, tiel ke necesis, ke ni retrinku cidron. Sed jen, varmecon post freŝeco, kaj freŝecon post varmecon, mi rimarkis, ke mi estis ĉirkaŭ naŭdek. Pri Polito, li ne estis fore de la metro.

La pordo malfermiĝis. Melia aperis, kaj tuj antaŭ ŝi salutis nin: "...Porkulego, vi ambaŭ ja atingis la metron."

Tiam Mateo ekkoleris: "Tion ne diru, Melia, ne diru tion, mi neniam atingis la metron."

Oni servis al ni bongustegan meztagmanĝon, antaŭ la pordo, sub du tilioj, apud la malgranda kapelo "Nia Damo de la Dika-Ventro", kaj vidalvide al la grandega pejzaĝo. Kaj Mateo rakontis al ni, kun mokado mikсата al neatendita kredemo, neverŝajnajn rakontojn pri mirakloj.

